

Vol. 1. December, 1906 No. 3.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

SECRETARIAL BUREAU

And International Esperanto Agency

For a small fee we receive, re-address and forward the business correspondence of firms or individuals requiring London office address. Samples of merchandise received in bulk and distributed to addresses as per lists supplied, or to addresses selected by us. We have extensive and varied mailing lists, maintained with greatest accuracy. To save expense of foreign postage we print or mimeograph circulars, etc., fill in names, addresses and dates of imitation typewritten letters, etc., supply and address envelopes, stamp and post complete. On statement of probable requirements further details will be supplied.

ADAIR & CO.

39 Victoria St., Westminster, London, England

Oklahoma City, U. S. A.

ESPERANTO AND THE RED CROSS.

It is the fervent hope of every Esperantist that the general dissemination of the language, knitting more closely the ties of human kinship which exist between the people of all nations, will hasten the coming of the day when war shall be impossible. Already there has been formed a peace society whose language is Esperanto. *L'Esperantiste*, official organ of the French society, announces the publication of a brochure entitled "Esperanto and the Red Cross," by Lieutenant Bayol, special instructor at the military institute of Saint-Cyr. It is printed in Esperanto and will be translated into every European tongue. The following commendatory letter to the author of the book was written by the author of the Esperanto language:

Dear Sir:—Your labor for the acceptance of Esperanto by the Red Cross I find very important, and wish you the greatest success. The Red Cross belongs to those institutions which greatly need such an easily-learned common language; because, while other institutions sometimes have business with those of a foreign language, and can possibly find an interpreter, the Red Cross nearly always is concerned with strangers and requires immediate comprehension. The noble labors of the Red Cross on the field of battle often lose all value solely because of a lack of mutual comprehension.

If you can ever obtain the general consent of governments that soldiers who are going to war shall learn the most important words of the international language, then you can say you have deprived war of a great measure of its cruelty and will give the Red Cross its actual value.

THEY NEED ESPERANTO.

What Esperanto might accomplish for the people of India is well illustrated in the following anecdote:

"There is an instance on record of a criminal case which was tried in Chittagong Hill tracts. One of the witnesses was a woman who knew only the Khami language. This was translated into Mru, which was then translated into Arakanese, which was again translated into the local dialect of Bengali, from which version the magistrate recorded the quadruply refracted evidence into English. . . . There are parts of India which seem to have had a special Tower of Babel of their own. From the little province of Assam, for example, with its population of only about six millions—say the same as that of London—ninety-six Indian languages were returned at the last census. Mezzofanti himself, who spoke fifty-eight languages, would have been puzzled here."

...L' Amerika Esperantisto...

Published Monthly

Publikigata Monate

Unua U. S. A. Gazeto de la Lingvo Internacia, Esperanto
Jara Abonpago, 1 Dolaro

Price per year, One Dollar

OKLAHOMA CITY, U. S. A.
408 BALTIMORE BLDG.

VOL. 1

DECEMBER 1906

NO. 3

**PAROLADO DE DOKTORO ZAMENHOF EN LA MAL-
FERMO DE LA GENEVA KONGRESO.**

• • • •

SinJORinoj kaj SinJoroj:

Mi esperas, ke mi plenumos la deziron de ĉiuj al-
estantoj, se en la momento de la malfermo de nia dua
Kongreso mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran
dankon al la brava svisa lando por la gastameco kiun ĝi
montris al nia Kongreso, kaj al lia Moŝto la Prezidanto
de la Svisa Konfederacio, kiu afable akceptis antaŭ
du monatoj nian delegitaron. Aparton saluton al la
urbo Genevo, kiu jam multajn fojojn enskribis sian
nomon en la historio de diversaj gravaj naciaj aferoj.

Permesu al mi ankaŭ esprimi en la nomo de vi ĉiuj
koran dankon al la organizintoj de la nuna Kongreso,
al la sindonaj svisaj esperantistoj, kiuj tiel multe kaj
senlace laboris en la daŭro de la pasinta jaro, fondis pres-
kaŭ en ĉiuj urboj de la svisa lando grupojn esperantis-
tajn kaj diligente faris ĉion kion ili povis por sukcesa
pretigo de nia Kongreso; al la Provizora Centra Or-
ganiza Komitato, kiu precipe en la persono de sia prez-
idanto tiel energie laboris kaj tiel diligente zorgis pri

L'AMERIKA ESPERANTISTO

ĉiuj preparoj; fine (sed certe ne malplej grave) al tiuj kaŝitaj amikoj, kiuj per malavara fondo de la Centra Oficejo, donis fortikan fundamenton por ĉiuj plej gravaj laboroj.

Sinjorinoj kaj Sinjoroj: En la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian paroladon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tia parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la runa jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko; mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la rajtoj de homo. Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel privata homo ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multemiliona lando, tamen kiel esperantistoj tiu ĉi batalado ne povas vin tuŝi, kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun farata ion kio nin kiel esperantistoj ne povas ne tuŝi. Ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la gentoj. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando—tie la naturaj filoj de la sama lando ŝetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel samaj naturaj filoj de tiu lando nur ĉar ili apartenas al alia gento. Estingiĝas ĉiutage tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado intergenta. Terura estas la stato de aferoj en la okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!

Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi en la urbo Bietovstok rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon kiu dividas inter si la naturajn filojn de la sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ mia bela sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon. En la stratoj de mia mal-

L'AMERIKA ESPERANTISTO

Feliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraĵoj sin ĵetas kiel kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpa konsistas nur en tio, ke ili parolas alian lingvon kaj havas alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj. Mi ne voias rakonti al vi la terurajn bestaĵojn de la bestega Bielovstoka buĉado; al vi kiel esperantistoj mi volas nur diri ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Oni scias ke ne la rusa gento estas kulpa en la buĉado en Bielovstok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estas kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la tartaroj aŭ armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare ke estas kulpa aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi ke la membroj de aliaj gentoj estas tute samaj homoj kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia. Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komuniki sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.

Ni ne estas tiel naiva kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas ke neŭtrala fundamento faros el homoj anĝeloj; ni scias tre bone ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas ke komunikiĝado sur neŭtrala fundamento forigos la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj kiuj estas kaŭzataj ne de

L'AMERIKA ESPERANTISTO,

malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni devas paroli pri ĝi pli klare. Estas jam tempo ke ni parolu pli klare kaj precize.

En la deklario unuanime akceptita en Boulogne'a Kongreso ni ĉiuj scias kio estas la esperantismo en rilato praktika; el tiu ĉi deklario ni ankaŭ scias ke "Esperantisto estas nomata ĉiu persono kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas." Esperantisto estas sekve ne sole tiu persono kiu uzas Esperanton sole kaj eksklusive por celoj praktikaj; Esperantisto ankaŭ estas persono kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon; Esperantisto estas persono kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi; Esperantisto estas fine eĉ tiu persono kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj malamaj. Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan—flankon idean. Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversaj manieroj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado kiel li mem deziras; aŭ, se li volas, eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj Esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj Esperantistoj la Bulonja Deklaracio precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: "Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la Esperantismo estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas." Sed bedaŭrinde la vorton "privata" kelkaj amikoj klarigis al si en la senco de "malpermesata" kaj

L'AMERIKA ESPERANTISTO

tiamaniere, anstataŭ konservi por la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika, kaj uzadi ĝin nur por utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde, en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj kiuj diras: "Esperanto estas nur lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun la ideo, ĉar alie oni pensos ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj kiuj ne amas tiun ideon!" Ho, kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el niaj koroj tiun parton de la esperantismo kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estas la ĉefa celo de la afero Esperanto kiu estis la stelo kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, mi indigne disŝiros kaj bruligos ĉion kion mi skribis por Esperanto, mi neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de mia tuta vivo, mi forĵetos malproksimen la verdan stelon kiu sidas sur mia brusto, kaj mi ekkrios kun abomeno: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj de praktika utileco, mi volas havi nenion komunan!"

Venos iam la tempo kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi estos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj scias tre bone ke al la laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri la praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo (ni ĉiuj sentas ĝin tre bone) estas frateco kaj justeco inter

L'AMERIKA ESPERANTISTO

ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis esperantismojn de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano. Kiam antaŭ dudek-ok jaroj rondeto de junaj diversgentaj gimnazioj festas la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam estas tempo." Nia himno kantas pri la "nova sento, kiu venis en la mondon," ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la nunaj esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon. Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉiu parolis pri ĝi, kaj sindone laboris. Kial do aliĝas al ni la personoj kiuj vidas en Esperanto "nur lingvon"? Kial ili ne timis ke la mondo ilin kulpigus pri granda krimo, nome pri la deziro helpi al iom-post-ioma unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj, kaj ke ili senkonsecie revas pri tio sama pri kio mi revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco, ĉu mi faris tiun pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino, longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto—ĉu ili ĉiuj faris tiun ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al lito de morto skribis al mi ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri ia praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! ĉiuj memoris nur pri la interna ideo entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatas Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la korpojn de la homoj, eĉ ne tial ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.

Vi memoras kiel forte ni ĉiuj estis entusiasmigitaj

L'AMERIKA ESPERANTISTO

en Bulonjo ĉe l'Maro. Ĉiuj personoj kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablan kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo; ĉiuj ĝin nomas "la neforesebla kongreso." Kio do kiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso—ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiu ja povas havi sur ĉiu paŝo multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj? Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne, ni tiajn ne havis en Bulonjo. La fakto ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiuj kongresoj de samnacionoj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentas tre bone ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la praktika utileco kiun Esperanto montris, sed la interna ideo de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en la koro. Ni sentis ke komencigas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentas la spiriton de ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone ke, ĝis la fina malapero de la muroj estas ankoraŭ tre kaj tre malproksima; sed ni sentas ke ni estas alestantoj de la unua forta ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis ke antaŭ niaj okuloj flugas ia fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tre nebula, kiu tamen de nun pli kaj pli korpigados kaj potencegados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti afero nur de praktika utileco. Ĉiu kiu uzas Esperanto aŭ laboras por ĝi estas esperantisto, kaj ĉiu esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. Tiaj esperantistoj kredeble ne venas al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj, praktika aŭ por malvarma diskutado pri la demandoj puraj lingvaj, pure akademias, kaj ili ne partoprenas en nia ĝojo kaj entuziasmo kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia koro, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉion ĉian internan ideon.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

Ili ne timos ke la mondo ilin nomos utopiistojn, kaj kenaciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nia nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

NI VARBU LA GAZETARON!

Ne pensu, karaj samideanoj, ke por la uzado de viaj hejmaj gazetoj kaj ĵurnaloj vi devas troe ellernadi la lingvon. La Esperanto estas tiel nova ke la tute senerara gazeto aŭ libro jam ne aperas, kaj se vi, verkante artikolojn pri la lingvo, faras malgrandajn erarojn, pensu ne ke vi sole eraras. Antaŭ nelonge aperis en multaj gazetoj artikolo pri Esperanto tre longa kaj bone verkita, sed ĥavanta erarojn videblajn je la sperta esperantisto. Sed ĉu la verkinto ne faris grandan helpon al la lingvo? Certe. Kiom multaj instruistoj por fremdaj naciaj lingvoj povas senerare verki en la lingvoj? Tre malmulte, oni pensus. Tial, gesamideanoj, varbu viajn hejmajn gazetojn, ĉu grandajn aŭ malgrandajn. Komigu je la redaktoroj, montru vian fremdan korespondataĵon kaj L'amerika Esperantisto.; klarigu al ili la progreson kiun la lingvo faras. Vi trovos ke, ordinare, la redaktoroj ĝoje kaj libere donos spacon por artikoloj pri Esperanto. Se al vi mankas la tempo por verki artikolojn, ĉerpu aŭ traduku el L'amerika Esperantisto.

La granda plimulto de la gravaj ĵurnaloj ĉiutagaĵoj de Ameriko nun uzas por ilia kompostado la maŝinojn de la "Mergenthaler Linotype Company," de Nov-Jorko. Tiu ĉi kompanio, vidinte la gravecon de Esperanto, kaj sendube per la klopodoj de iu samideano kies nomon ni ne scias, decidis vendi la karakterojn specialajn esperantajn je la prezoj ordinaraj, kaj nun ilin vendas. Se ia ĵurnalo deziras uzi karakterojn esperantajn, nepre ilin sciigu pri tiu ĉi fakto, kiu estas granda helpo al la afero de Esperanto.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

PRI KIO NI DEVAS PAROLI?

“La redakcio ne povas publiki artikolojn pri politiko aŭ religio, aŭ pri ia temo kiu povas naski diskutojn—kiel ofte oni vidas la antaŭan frazon! Sendube tio ĉi estas prudenta por gazeto de Esperantista societo, sed ne tiel estas L’Amerika Esperantisto. La celo de lingvo estas esprimadi pensojn, kaj se ĉiuj personoj ĉiam pensus same, tiam ni ne bezonus lingvon. Sekve, se vi havas opinion ne tro antikvan, kaj povas bone ĝin esprimi en Esperanto, ni ĝojus ricevi de vi artikolon por publikigo. Large, la politiko kunfaras kun la interrilatoj de homoj; ĉiu taŭga religio, same. Kial, do, lingvo internacia ne estus la preciza ilo por intersanĝado de opinioj? Kaj ekster tiuj ĉi, kiaj temoj taŭgas por diskutado? Ĉu devas la parolo de esperantistoj esti limigata je simple “Ho, tiel bela tago!” “Jes, sed mi timas ke pluvo falos antaŭ ol vespero!”

Ciu gazeto de Esperanto devas, por averti novajn esperantistojn,, montri per grandaj literoj la avizon: “Ne malŝparu tempon por skribi pri dezireblajn ŝanĝojn je la lingvo Esperanto!” Oni kredus ke, se tiuj saĝuloj ĉeestus la kreadon de la mondo, kaj Dio diris al ili ke li havas planon porfaligi pluvon el nuboj, ili nepre konstatus per argumentoj tre taŭgaj, ke tio estas neniel ebla. La fondaĵo de la lingvo jam de longe sin fiksiĝis kaj sin montras en la “Fundamento de Esperanto,” en kiu, laŭ la deklaro de la Boulogne’a Kongreso, neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Al tiu oni povas aldoni “nek la rajton, nek la eblon,” ĉar ĝi klera amiko de lingvo internacia povas vidi ke ni nun konstruas la trabaĵon de la templo, kaj eĉ se, eble, malgranda malperfektaĵo sin montras, ni ne devas interrompi la fondaĵon por ĝin korekti. Ne; pli bone ol stari antaŭ la laborejo kaj kritiki la laboristojn estas eniri tien, suprenigi la manikojn, kaj helpi al la bonan laboradon. Oni povas pli frue varbi cent rekrutojn al la vicoj esperantistaj ol fari la ŝanĝon de unu litero en la Fundamento de Esperanto.

AL ESPERANTISTOJ ASTRONOMIISTOJ.

Dum la dua kongreso, en Genevo, okazis multaj kunvenoj por diversfakaj specialistoj—leĝistoj, matematikistoj, katolikoj, anarhiistoj, framasonoj, ŝakludistoj, kaj oni fondis eĉ sciencajn sekciojn. Tiu scienca sekcio enhavas diversajn sub-sekciojn, apartigitajn laŭ la diversaj fakoj. Tial, ni kredas ke ni povas jam de nun utili la aferon, publikigante la jenan alvokon, per kiu nia kara kunlaboranto, F. de Roy, sin turnas al ĉiuj esperantistoj astronomiistoj:

Estas fakto certa ke la progreso de Esperanto multe dependas de la kreo de teknikaj vortaroj, kaj, dum la lasta tempo, tre grava penado estas farita en tiu ĉi direkto. Dezirante, en mia speciala fakoj, kunlabori al la afero, mi provis formi vortaron de astronomio kaj parencaj sciencoj

Evidente, tia laboro ne povas esti la verko de unu homo sola. Dezirante, en mia speciala fakoj, kunlabori al tiu celo, mi invitas la kunlaboradon de aliaj, kaj esperas ke multaj esperantistoj el diversaj landoj kunhelpu al ĝi. Jam en 1903 mi skribis al multaj personoj kaj grupoj en la tuta esperantistaro, petante ke la astronomiistoj respondu mian proponon. Malfeliĉe, krom du esceptoj, Esperanto ne ŝajnis esti la lingvo de astronomiistoj, kaj la verko senprogresis. Mi nun ripetas kaj ampleksigas mian proponon, kaj forte petegas ke la esperantistoj de ĉia ajn lando, kiujn la afero interesas, bonvolu skribi al mi. Mi do esperas ke baldaŭ mi povos verki kaj presigi bonan vortaron por tiu scienco, unu el la plej internaciaj.

Adresu Felix de Roy, 342 Chausse de Turnhout, Borgerhout, (Anvers) Belgujo. (Kunlaboranto de la Belga Sonorilo, membro de la astronomiaj societoj de Belgujo, Francujo kaj Anglujo.)

L'AMERIKA ESPERANTISTO

LA GERANIA BRANĈO.

La sekvanta estas traduko el la germana de Sino. Ilse Frapeau, kaj aperis en la Oktobra numero de "L'Esperantiste":

* * * *

Josefo Fumasoli estis mortinta; lia metio ne nutris lin. Fari novajn ŝuojn el malnovaj botoj ne estas profitinda industrio. Spite la tuta penado de la laboristo, la fabrikita komercaĵo ne estas nova, kaj la brokantisto, kiu loĝis apud la pordo de la sinagogo, ĵuris pri ĉiu nova paro liverita de la ŝuflikisto, ke ĝi ne trovos akiranton, kaj li pagis malpli kaj malpli por la alportita komercaĵo. De tio rezultis ke malgraŭ ĉiutaga laborado deksex-hora Josefo Fumasoli mortis pro malsato. Iam li tre malrapide glitis de sia skabelo teren, iom ŝancelinte dekstren kaj maldekstren, kvazaŭ li estus ebria.

Lia maljuna patrino, kiu loĝis kun li en tiu sama senaera kaj senluma kavo, preskaŭ kelo, reinerante sen ia suspekto kun sako da malnovaj botoj sur ŝia kurba dorso, trovis lin kuŝantan meze de la tranĉitaj ŝupecoj, eluzitaj alplandoj, difektitaj kalkanumoj, disaj najloj kaj iloj sur la grasa kaj piedpremita tero. Li jam estis senviva kaj malvarmega.

Ŝi lasis fali teren sian sakon kaj jetis sin apud sia filo, sur la koto inter la ledaj detranĉaĵoj.

De la apuda pordo najbarino, Pompanini, aŭdinte sovaĝan krion de terurego, enigis sian kapon kaj rigardis. Ŝi vidis la senvivan viŝaĝon de Josefo, vaksoflavan, malgrasegan, kun ĝia pinta mentono provizita je maldensa, nigra barbeto, kuŝantan sur la genuoj de lia patrino, kaj tiu ĉi klinanta al li sian kapon kovrita per ruĝa tuko ondumanta, kaj ne unu sonon eliganta plu.

Ankoraŭ estis ŝi en la sama situacio kiam panjo Pompanini per siaj alvokoj kaj krioj estis amasiginta ĉiujn loĝantojn en la strateto, kaj eĉ veniginta (oni ne scias de kie) kuraciston.

Tiu estis sinjoro estetike kulturita, kaj kiam li vidis

L'AMERIKA ESPERANTISTO

la grupon tere kuŝantan, la sintenado de ambaŭ korpoj lin impresis—la antikva kaj eterna temo de la “Dolorpatrino kun mortinta Kristo.” Kaj li pensis pri lia amiko, pentristo Simbolizetti, al kiu bedaŭrinde mankis tia modelo de moderna “pieta.” Krom tio, la kuracisto havis nenion plu por fari. Rapide li ekzamenis la korpon sternitan laŭ ĝia tuta longeco, kaj konstatis la morton. La kaŭzo: nesufiĉa nutron.

Poste li forkuris kiel eble plej rapide, konjektante ne sen praveco, ke oni petus ion de lia monujo en tiu kvartalo, tiel malriĉa kaj mizerplena.

Josefo mortinta pro longedaŭra malsato estis enterigita la morgaŭnan tagon. Panjo Fumasoli apenaŭ konsciis pri tio kio okazis. Se la najbarino ne estus zorginta pri la afero, kredeble Josefo kuŝus nelavita en la plata ĉerko kun la fingroj kuntirigitaj, ankoraŭ nigritaj de le ŝuista peco, kaj la korpo vestita per sia eluzita laborbluzo kun grizaj kvadratoj.

Panjo Fumasoli lavis sian filon nur per siaj larmoj; ŝi lin rigardadis senĉese, sed ŝi tute ne helpis. Kiam la malriĉula ĉerko estis najlita super ŝia Josefo, ĉiu bato de martelo frapis ŝian tremetantan koron, kaj se la estitike kulturita doktoro estus reveninta en tiun kavernon de malespero, li estis povinta denove ŝin kompari kun Sankta Virgulino riĉa je suferoj, kies brusto estis trapikita de sep glavoj.

Sep glavoj! Jes! Sed kial nur sep?

Estas doloro ĉar la filo mortis. Estas la ĉagreno tial ke li tiel juna foriris. Estas la teruro pri la morgaŭna tago. Estas la sopirado al la malaperinto, kiu partoprenis en ĉiuj ŝiaj turmentoj. Estas la malespero ĉar li mortis tiel forlasita. Estas la korsufero ke la nesateco mortis lin. Estas la nekontentigebla deziro aŭskulti lin parolantan unufoje ankoraŭ. Estas la loko mem, tute malbela, sur kiu li kuŝas. Estas la detruanta malĝojo, kaj la izoleco; estas—

Sep glavoj? Jes! Kial nur sep?

* * * *

Josefo do estis enterigita en komunan fosajon. Ĉu

L'AMERIKA ESPERANTISTO,

li ja, en sia vivo, ne estis ano de la senglora kaj sennoma amaso? La loko ĉe la tombejo similis sablan kampon nove plugitan, sur kiu kreskis sennombraj kruĉetoj ne-regule plantitaj, dense ĉe kelkaj lokoj, pli maldense ĉe aliaj.

Dekstre etengiĝis seka dezerto, ankoraŭ pli vasta kie la nigraj kruĉetoj, malgrandaj kruĉetoj, ankoraŭ pli dense alpremiĝis unu al la alia. Tio estis la loko difinita por la infanoj de tiuj malriĉeguloj.

Sed maldekstre—ha, maldekstre, tute malsame! Tie verdis florkronoj, kaj en siaj vazoj floris kreskaĵoj post elegantaj kradoj, nigraj kaj oritaj, antaŭ marmoraj tabuloj kun oritaj surskriboj, apud kolonoj de multkolora porfiro, ornamita per blankaj medalionoj de la mortintoj, antaŭ brilegaj statuoj kun vualitaj vizaĝoj kaj tordigitaj manoj.

Tiel oni honoras la tiujn, al kiu nenio mankis dum ilia vivo, kaj pro tio mem, ke ili ĝuis komforton kaj bonstaton dum sia vivo, ili devis esti ankoraŭ esceptaj trans la morto; tiujn kiujn oni ne havas la permeson maldistingi el la granda amaso vulgara kaj senglora.

En tiu tombejo tre larĝa vojo apartigis la malriĉulan kvartalon de la riĉula tombaro.

Panjo Fumasoli nenion sciis pri tio. Generale ŝi malmulte sciis. Si estis malriĉa virino, malriĉe naskita, mizere kaj malklere vivanta. Se iam pensoj estis trovitaj en sia kapo, de longe la mizerego kaj malsato en ĝi faris malplenecon. Nek ŝi komparis, nek rezonis.

Nur ŝi vidis.

Si vidis per siaj okuloj duone estingitaj de ploroj, la flavan teron kaj la truon kien sia Josefo estis mallevita, la truon kiun murmurante la tombisto rapide plenegis per sia fosilo. Kaj kiam la viro laborante pasis inter si kaj la tombo, ŝi vidis flanke, maldekstre, la flameruĝan geraniojn, la palajn rozojn kaj la palmajn faskojn kiuj ornamas la tombojn de la riĉula tombaro.

Jen la tombisto finis sian laboron. Li ebenigis sur la supraĵo la plej videblajn neegalaĵojn de la tombo, kraĉis teren, metis sian fosilon sur sia ŝultro kaj foriris.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

Panjo Fumasoli pene restariĝis, signis sin kruce, sin klinis meze de la vojo antaŭ Kristo je sanga flanko, najlita sur lia kruco de martirulo, prenis iom da sankta akvo kaj per ŝiaj bluiĝintaj fingroj tremantaj pro frosto ĝin ŝprucigis sur la tombon. Poste, irante en la maldekstran kvartalon ĝis tombo aparte riĉa kaj ornamita per multkoloraj floroj, ŝi ekkaptis, super la malalta krado, branĉon de geranio, kun ruĝaj floroj, kiel sango freŝe verŝita. Poste, premanta la branĉon sur sian suferegantan koron, ŝi revenis al la tombo de sia Josefo, sin ĵetis teren, kaj delikate kaj zorge enigis la floran branĉon en la pulvorigeblan teron, solan floraĵon sur tio vastega kampo popola semita je krucoj.

Pli ĝuste, ŝi preparis sin por enigi la branĉeton en la truon, kiun ŝi ĵus faris per sia fingro, kiam la tombeja gardisto ŝin rimarkis. De la ekstremaĵo de la vojo li estis vidinta la ŝtelon, kaj li alkuris grandapaŝe. Lia vizaĝo estis ruĝa pro kolero, lia gestoj vivegaj.

Kia honto vere se ĉiu en la mondo venus kaj nudigus la riĉulajn tombojn kies zorgado liveris al li panon! "Kion vi ŝtelis, maljuna sorĉistino?" li kriis al la tremanta kulpulino. "Vi kuraĝis tion ŝteli el la tombo de Lia Subprefekta Moŝto! Tion mi bone vidis! Sed vi pentos pro ĝi!"

Kaj li rapide metis teren la florzakojn kiujn li portis. Poste, kiel brava kaj vigla gardhundo, li ekkaptis per unu mano la floran branĉeton, per alia la malgrasan brakon de Panjo Fumasoli, preskaŭ svenanta pro honto kaj teruro, kvankam ŝi apenaŭ komprenis sian krimon, tra la pordo de la ripozkampo, foririgis ŝin eksteren, sur la straton homplenan, kaj poste, kontraŭen, al la policejon atendantan kiel kavaĵo sur la vojrandoj.

"Ŝtelinta?" En ŝtelokazo apliku tiun aŭ alian paragrafon de la Puna Leĝaro, kaj ĉio estas finita. Nenio pli simpla! Panjo Fumasoli estis kondamnita al ok tagoj da malliberigo pro ŝtelo sur tombo.

* * * *

La eleganta urbo Milano, tiu belega Parizo de Italujo, tute ĝoje agitiĝas. La printempon per flora karnivalo

L'AMERIKA ESPERANTISTO

ĝi festas. La magazenaj vitraĵoj brilegas en nekutima maniero. Multkoloraj tapiŝoj pendas antaŭ la fenestroj; flagoj kaj standardoj, mastoj ornamitaj per abiaj branĉoj kaj ĉiukoloraj banderoloj plibeligas la stratojn. Super la larĝaj vojoj, ĉiudirekte kuras girlandoj kun surskriboj, vitraj kaj paperaj iluminiloj, kiuj balanciĝas. La tuta vojo trairota de la belega kaj florplena sekvantaro estas admirinde ornamita; same ankaŭ la publikaj ĝardenoj, kie de tagoj kaj tagoj oni falĉas, fosas kaj purigas por malaperigi la postsignojn de la vintro.

La blindiga kaj pika marta suno brilegis super la kopolo el blanka marmoro, la norda vento de la monto tranĉe blovadas laŭlonge de "Corso Garibaldi"; sed la printempo komenciĝis—tion dekretis la kalendaron.

Kiel oni sin interpremas sur la stratoj kaj placoj! Kiel la plumoj de la "bersaglieri" (kies misio estas restigi libera la mezon de la vojo) agitiĝas kaj kunkuras kun la blankaj vualoj kaj nigraj mantiloj de la virinoj. Printempo ĉeestas! Printempo estas dekretita!

Vivu ĝia heroldo!

Vivu la suna radio, kiu servas ĝin kiel serva sendito!

Bela fraŭlo, brilege vestita per orflava silko, alvenas rapidgalope. Li antaŭsciigas la sekvantaron.

Oritajn bridojn kaj hufojn havas lia nigra ĉevalo; eĉ sur ĝian kolhararon oni disŝutas oran polvon. Mal-longa mantelo radie tranĉita flugas ĉirkaŭ la ŝultroj de la junulo. Senĉese li ŝvingas mallarĝan kaj longan standardon el flava silko, kaj lia bela vizaĝo kun nigraj okuloj disdonas ridetojn tiel malhumilajn kaj venkajn kiel se li estus vere la dio de la suno.

Kaj post li flirtas kaj amasiĝas la floroj ŝetitaj, sin interpremas la veturiloj malaperantaj sub la floroj.

Tio estas vera diboĉo de floroj, subflora dronigo, malsparaĵo bonodora, ŝprucado ekfloranta de la aroganta riĉeco. Kaj ĉe la loko mem, kie la veturiloj plej interpremas sin, kie la floroj defalas kvazaŭ vera pluvo, inter la radoj de la veturiloj kaj la ĉevalaj hufoj, jen Panjo Fumasoli trenata al malliberejo staranta sur la kontraŭa flanko de la vojo. Kia vidaĵo por la ĝojantoj! Ne! la

L'AMERIKA ESPERANTISTO,

polico estas tre mallerta! Feliĉe, tion vidis nur kelkaj personoj, kiuj rapidis deturni siajn okulojn de tiu kurbiginta sesdekjarulino, de tiu Panjo Fumasoli maljuniginta en la honesteco kaj plorinde defalinta dum la sesdeksepa jaro de sia vivo ĝis kondamno pro ŝtelo.

Ankaŭ ŝi nenion vidis pri la sensaĝa festego de tiuj kiuj ĝojas kaj bruegas sur la floroj kaj koroj piedpremitaj. Antaŭ ŝiaj okuloj starigas la figuro de sia Josefo, kiu penadante dum dek ses horoj ĉiutage, mortis pro malsato.

Kio estas por ŝi tiuj ĉaroj? Kio tiuj fremduloj vestitaj per silko kaj oro?

Kia rilato inter tiu gento kaj ŝia?

Subite io falas je ŝiaj piedoj, ruĝa floro de geranio. Panjo Fumasoli eksaltas malantaŭen, faletas, kun korpomateco rigardas flanken, al la gardisto, kiu ŝin kondukas; poste ŝi zorge transpasas la branĉeton tiamaniere, ke ĝi ne ektuŝu ŝin; tiam signante sin kruce kvazaŭ antaŭ diabla kombino; ĉu Satano yolas ŝin tenti duan fojon?

Kaj kurbigitaj, per tremantaj paŝoj, ŝi sekvas la policanon en malliberejon, kiun starigis la homaj senpekaj por la malindaj kulpuloj.

Abonanto de L'Amerika Esperantisto skribas el Bryant, Wisconsin, demandante "kial Esperanto ne pli fidele konservas ĝian propran stilon de vortfaradon." Li citas la vortojn "delegacio" anstataŭ "delegitaro"; "biblioteko" anstataŭ "libraro". "Delegacio" estas tre regule Esperanto, kiel oni povas kompreni, vida nte "redakcio," "direkcio", "administracio", k. t. p. Esperantistoj uzas la vorton "librejo" por signifi lokon kie oni vendas librojn; "libraro" oni uzas tre libere por signifi aron de libroj; sed "biblioteko" nepre havas la signifon de la angla vorto, "library."

AMERIKA ESPERANTO

**Publication delayed. "You will receive
copies when issued"**

**Publisher,
April 11, 1907**